Johann Wolfgang von Goethe,

[Koro mia, kio iĝas]

tradukita de Manfred Retzlaff

Nova amo - nova vivo

Koro mia, kio iĝas?
Kio tiel pelas vin?
Mia vivo aliiĝas,
Ne plu mi rekonas min.
Foras, kio mn ĝojigis,
Foras, kio min tristigis,
Foras ja trankvilo mia.
Aĥ, pro kio ĉio tia?

Ĉu katenas min juneco
Aŭ ĉarmeco de l' knabin'?
La rigardo de boneco,
Ĉu ĝi tiel ligas min?
Se mi volas kuraĝiĝi
Kaj rapide retiriĝi,
Sammomente iras mi
Pretervole re al ŝi.

Kaj per tiu serĉ-fadeno
la knabino tenas min.
Granda estas mia peno,
Mi tro multe amas ŝin.
En feina cirklo ŝia
Enŝlositas vivo mia.
Ĉio aliigis sin!
Amo, amo, lasu min!

Traduko de la Germana poemo "[Herz, mein Herz was soll das geben?]" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1983.*

MR-036-1 / Arg-725-1462 (2012-12-26 23:41:24)